
# En interreto



En la Ĝenerala Asembleo de la membroj de la Asocio, de dato 17a de februaro de 2005, oni renovigis la estraron, kiu restis tiele: Prezidanto: Santiago Mulas Gallego, Sekretario: Faustino Castaño Vallina, Kasisto: Juan Manzano Bartolomé, Bibliotekisto: Ángel García Sánchez, Voĉdonantoj: Carlos Enrique Carleos Artime, María del Mar Pescador Benavente, Cristina Díez Álvarez-Cienfuegos, Alejandro Rodríguez kaj María Luisa Castaño.







Post la jaro 2004 sen revuo, la numero 80a de **HELECO** estis eldonita en oktobro de la jaro 2005. Ĉi foje la eldonado eblis dank' al la Katedro Jovellanos kiu, tiam, disponis de bona fotokopiilo. El la Komisiono pri Kulturo de la Urbestraro ne eblis ricevi subvencion kiu kompensu la elspezon de la fotokopiado. Iu novaĵo de tiu numero de la revuo estis ke ĝi estis tute kolora, sed tio ne povis esti perceptata de la ricevantoj de la revuo, ĉar la fokopiaĵoj de la paĝoj estis blank-nigraj; pro la alta kosto, nur la fronta kaj la dorsa paĝoj estis presite kolore. Sed oni povas vidi en sia kolora versio en la interreta paĝo de nia Asocio, ĉar la ĉefa karakteraĵo de ĉi tiu lasta periodo de nia jarcenta historio estas tio ke **Astura Esperanta Asocio** eniris en **Interreton** kun propra paĝo, en kiu ni metas ne nur la revuon sed multe da materialo kiu rilatas ne nur al **Esperanto** sed al ĉiu ajn afero.

Iu el la pri Esperantaj aferoj estis la raportoj de la festado de la Zamenhofa Tago far de la asturaj geesperantistoj. Ekde la festo de la jaro 2003, la membroj de **Astura Esperanta Asocio** de Gijón kaj **ANTAŬEN** de Avilés povas eltiri el tiuj subpaĝoj la fotojn kiujn ili dezirus, ĉar la raporto ne estas nur priskribado de la festoj sed ankaŭ, kaj ĉefe, kolekto de la fotoj faritaj dum la festado.

La ĉefa temo de la numero 80a de **HELECO** estis la verko de Cervanto, DonKiĥoto, ĉar en tiu jaro 2005 oni festis la 4an Centjaran Jubileon de la unua eldono de la unua parto de tiu majstrverko de la hispana literaturo.

Dum la lernojaroj 2004-2005 kaj 2005-2006 daure estis la E-kursoj gvidataj de Santiago Mulas.

La 30an de marto de 2006 okazis la tiujara Ĝenerala Asembleo de **AEA**. En ĝi oni elektis novan estraron de la Asocio, nome:

-Honora Prezidanto: Santiago Mulas Gallego. -Prezidanto: Carlos Enrique Carleos Artime. -Vicprezidantino: María del Mar Pescador Benavente. –Sekretario: Faustino Castaño. –Presaro: Faustino Castaño. -Kasisto Santiago Mulas Gallego. –Bibliotekistino: María Luisa Castaño. -Voĉdonantoj: Ildefonso Domínguez Losada, Eduardo Montoto kaj Celia Rendueles.

Kiel dirite, oni festis en Hispanio en 2005 la 4an Centjaran Jubileon de "La Kiĥoto". La hispana esperantistaro aldoniĝis al tiu festado kun sia propra programo. La **Fundacio de Esperanto** kontribuis al tio per la disdonado, al bibliotekoj kaj aliaj prikulturaj centroj, de la esperantlingva versio de tiu verko. Nia **Astura Esperanta Asocio** kunlaboris kun la Fundacio en tiu tasko per la transdonado de du ekzempleroj de la Kiĥoto laŭ la esperanta versio de Fernando de Diego, al kiuj ni aldonis ekzemplerojn de nia propra eldonaĵo, **ASTURA BUKEDO**. Sed tiuj aktoj, pri kiuj estas abuda informo en nia interreta paĝo, okazis en la jaro 2006, tamen en la unuaj monatoj de la jaro kaj kadre de la festado de la Centjara Jubileo. La unuan transdonon oni faris al la Universitato de Oviedo, la 3an de marto. Profesoro Carlos Enrique Carleos Artime, el la estraro de **Astura Esperanto Asocio**, kaj doktorino María José Álvarez Faedo transdonis la libron de la Kiĥoto en Esperanto al la Vicrektorino de la Universitato, Margarita Fuente Noriega, kaj al la Direktoro de la Biblioteko de la Universitato, Ramón Rodríguez Álvarez. La prezentado de la akto estis farita de Luis Valdés Pelaez, tiama Direktoro de la **Katedro Jovellanos de Universitata Disvastigo**, institucio en kiu estas enkadrigata nia Asocio de Esperanto.